

I^pI

Informilo *por* Interlingvistoj

n-ro 112 (3/2020) ◆ 29-a jaro (tria serio) ◆ ISSN 1385-2191

*Eldonas: Esperantic Studies Foundation (ESF) en la nomo de
la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)*

www.esperantic.org www.facebook.com/esperantic @esperanticsf @esfacademic

ENHAVO

Bonvenon 3

Venontaj eventoj 4

Monda Fest' 2020 (UN 75-jara: Dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiĝanta mondo)	4
Aranĝo de la Interlingvistikaj Studoj de AMU	5
Progreso ĉe la Universitato de St Andrews, Skotlando	5
Kronviruso kaj universitata vivo	5
IATIS: Nerekta tradukado kaj daŭripova evoluigo	6
Kunpens(ig)ado: Esperanto kaj Universitatoj	6
Reta seminario pri esplormetodoj en traduk- kaj interpret-studoj	6

Raportoj 7

Agado de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj	7
Stipendio ESF ĉe la Universitato de Masaĉuseco	9

Libroj 10

Ulrich Lins: <i>Dangerous Language</i>	10
Detlev Blanke: <i>Internationale Plansprachen (Eine Einführung)</i>	10
Lingvaj rajtoj en la Eŭropa Unio	10

Artikoloj 11

<i>Mots</i> : Plurlingvismo en internaciaj organizoj	11
<i>Language Problems and Language Planning</i> , volumo 44, numero 1 (2020)	11
Esperanto kaj Endanĝerigitaj Lingvoj	11

<i>Estudios de Lingüística del Español</i> 41 (2020)	12
<i>Język, Komunikacja, Informacja</i> 14 (2019)	13
Translating Sustainable Development Goals (SDGs) Into Chichewa: A Quick Efficacy Assessment	13
Decolonial Subversions	14

Diversaj 15

Sinalligo al modelo	15
Enketo pri dedistanca lernado	15
Instruista/esplora asistanto ĉe la Universitato de Ĝenevo	15
Enketo ĉe la 75-jariĝo de Unuiĝintaj Nacioj	16
Pereis grava biblioteko pri planlingvoj	16
Doktoriĝa posteno ĉe KU Leuven	17
Victor Sadler	17
Hans Erasmus	17
Esperanto kaj la vera origino de la eŭro – reagoj	18
Historio de la nuna <i>Informilo</i> kaj ĝiaj antaŭuloj	18

Stipendioj de ESF 19

BONVENON

Lastatempe en la retejo de la usona Instituto Smithsonian aperis interesa artikolo* pri la problemoj spertataj de registaroj tra la mondo ĉe tradukado de la novaj terminoj, esprimoj kaj konceptoj – ekzemple “socia distancado/izoliĝo” kaj “platigi la kurbon” – kiuj nepre uziĝu en publikaj informiloj pri metodoj por minimumigi la disiĝon de la nova malsano. (Interalie la artikolo indikas rekomendon de oficuloj en la usona ŝtato Florido, ke la homoj restu unu de la alia je distanco de “unu aligatoro”. En Esperantujo ĉu eventuale temus pri “unu krokodilo”?)

Simile, artikolo en blogo** listigis virus-rilatajn aldonojn, kiuj nun disvastiĝis virusece en la ĉiutaga vortprovizo de Esperanto mem.

Fakto estas, ke, dank’ al la ekzisto de tiuj samaj modernaj komunikiloj, kiuj tiom faciligas la publikigon de tiaj artikoloj, Esperantistoj kaj interlingvistoj neniel dormas en ĉi tiu stranga pandemia nuntempo, sed floras virtuale.

Do ĉi-numere *IpI* enhavas multajn menciojn pri retaj kunvenoj kaj prelegoj, inkluzive la gravan Mondan Festivalon de Esperanto (ĵam komenciĝintan, kiam vi legos ĉi tion), kiu efektive anstataŭas la ĉi-jaran Universalan Kongreson. Ni tute bonvenigos sciigojn pri retaj okazaĵoj kun interlingvistika temo, ĉu anoncojn pri venontaj, ĉu raportojn pri pasintaj. Bonvolu noti, ke la limdato por kontribuoj al nia venonta kajero estos la 30-a de septembro.

Nature ni esperas, ke ĉiuj partoj de la mondo revenos kiel eble plej baldaŭ al iaspeca normaleco, kaj ke intertempe niaj legantoj restos kiel eble plej sanaj.

Simon Davies
(redaktoro)

* <https://www.smithsonianmag.com/arts-culture/how-social-distancing-can-get-lost-translation-180974723/>

** <https://pionirojdeesperanto.wordpress.com/2020/06/04/la-viruso-ne-parolas-esperanton/>

VENONTAJ EVENTOJ



MONDAFEST' 2020
LA MONDA FESTIVALO DE ESPERANTO
20 JUNIO – 20 SEPTEMBRO

Monda Fest' 2020

(UN 75-jara: Dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiĝanta mondo)

<https://mondafest.net>

<https://mondafest.net/programo>

<https://eventaservo.org/e/mondafest2020>

La Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020) estas realigo de Universala Esperanto-Asocio kune kun E@I kaj Vinilkosmo, oficiale subvenciata de ESF. Ĝi okazas inter la 20-a de junio kaj la 20-a de septembro 2020, kaj en ĝia kadro okazos la Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto.

La VK omaĝas al la Universala Kongreso (UK), kun virtuala aliro al esencaj programeroj de la UK kaj enkonduko de novaj ideoj. Ĝi estas senpaga por individuaj membroj de UEA. Informoj kiel registriĝi (kion devos fari ankaŭ senpagaj partoprenantoj, laŭeble frue) haveblas ĉe eventaservo.org/e/vk.

Ĝi havas unu ĉefan programon, kiu daŭros averaĝe po ses horoj tage (12:00 ĝis 18:00 UTC). Ĝi celas rekrei la specialan etoson de la UK, per libera babilejo, renkontiĝaj ĉambroj, disdividiĝo en malgrandajn diskutgrupojn kaj riĉa menuo de prelegoj. Okazos la Internacia Kongresa Universitato kaj la Scienca Kafejo, kaj eĉ virtuala Ekskursita Tago!

Pli pri la Festivalo ĝenerale oni povas legi ĉe la ĉi-supraj retadreso. Pri la emblemo de MondaFest' 2020, kiu reprezentas la spiriton de la Festivalo, legu ĉe revuoesperanto.org/logo-fest.

Aranĝo de la Interlingvistikaj Studoj de AMU

<http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/simpozio2020.html>

La planita 5-a Interlingvistika Simpozio en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano (Pollando) okazos rete, de la 17-a ĝis la 18-a de septembro 2020, pri la anoncita temo “Rolo de lingvoj en interkultura komunikado”. Ĝi estas malfermita ankaŭ por neesperantistoj.

Konfirmitaj prelegantoj: Prof. Věra Barandovská-Frank, Prof. Nicolau Dols Salas, Prof. Sabine Fiedler, Prof. Federico Gobbo, Prof. Przemysław Grzybowski, Prof. Wim Jansen, Prof. Goro Kimura, Prof. Ilona Koutny, Dr Katalin Kováts, Jan van Steenbergen, Dr Ida Stria, Prof. Bengt-Arne Wickström.

Post la simpozio oni planas eldoni libron el elektitaj prilaboritaj prelegoj.

Progreso ĉe la Universitato de St Andrews, Skotlando

<https://www.liberafolio.org/2020/05/18/esperanto-allogas-esploristojn-pri-internaciismo>
<http://standrewstransnational.wp.st-andrews.ac.uk/research/esperanto-and-internationalism-c-1880s-1930/>

Prof. Bernhard Struck informas nin, ke la centro de Esperanto-studoj ĉe la Universitato de St Andrews bone progresas. Ĉiuj tri unuajaraj doktoriĝaj studentoj faris konsiderindan progreson: Marcel Koschek, kiu esploras pri Varsovio kiel ĉefloko, lokaj kaj transnaciaj retoj, kun ĉefa fokuso al TEKA kaj kuracistoj; Pilar da Lamo Requero pri Katalunio kaj la Ibera Duoninsulo, Esperanto kaj naciismoj en tiu regiono; kaj Manuela Burghela, kiu faras ciferecajn esplorojn anstataŭ surloka laborado en Rio-de-Ĵaneiro, ĝis sekura vojaĝado eblos.

La grupo organizis iom da kunvenoj antaŭ la kronviruso, kaj poste rete per Zoom kun la Glasgova Esperanto-klubo, bonvenigante prezenton de Guilherme Fians en Manĉestro. Mallonga intervjuo pri la agado de la grupo aperis en *Libera Folio* (ĉe la ĉi-supra adreso).

En oktobro Prof. Struck faros prezenton pri Esperanto, en Litovio kaj en Prago, kaj la projekta grupo prezentos ĉe le Edinburga kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) en julio 2021. Marcel Koschek kaj Struck prezentos en Varsovio fine de oktobro 2020.

Kronviruso kaj universitata vivo

<https://www.tejo.org/kontribuu-al-video-pri-kronviruso-kaj-universitata-vivo/>

Laŭ la iniciato de sia Interesgrupo pri Universitata Agado, TEJO preparis kvaran elsendon en la filmoserio “Esperantistoj kaj kronviruso”. Ĉi-foje temas specife pri universitatoj.

IATIS: Nerekta tradukado kaj daŭripova evoluigo

<https://www.iatis.org/index.php/7th-conference-barcelona-2021/item/2242-panels#P4>

Oni petas kontribuojn de referaĵoj pri la temo “Nerekta tradukado kaj daŭripova evoluigo” por la konferenco de IATIS (Internacia Asocio por Tradukaj kaj Interkulturaj Studoj) en 2021. La limdato estas 15 septembro 2020.

Kunordigas Hanna Pieta (Universitato de Lisbono), James Hadley (Trinity College Dublin), Jan Buts (Trinity College Dublin) kaj Laura Ivaska (Universitato de Turku).

Kunpens(ig)ado: Esperanto kaj Universitatoj

<https://www.espero.ir/eo/category/kunpensigado/>

Ĉiuj estas invitataj partopreni en ĉi tiuj Zoom-sesioj, aranĝitaj de Ahmad Mamdoohi, esplorantaj la rolon de Esperanto en universitatoj. La jamaj estas spekteblaj ĉe la ĉi-supra adreso. Sesioj diskutas tiajn temojn kiel internaciajn korespondajn universitatojn en kaj por Esperanto kaj virtualajn internaciajn Esperanto-universitatojn, sur fono ampleksanta ĉion de la Komenio-projekto por Internacia Koresponda Universitato en la 1980-aj jaroj ĝis la hodiaŭa Internacia Reta Esperanto-Universitato.

Reta seminario pri esplormetodoj en traduk- kaj interpret-studoj

<https://www.unige.ch/formcont/cours/data>

La Universitato de Ĝenevo anoncis mallongan kurson en la serio ReMeTIS:

“Nia reta kurso ofertas unikan okazon al doktoriĝaj aŭ antaŭdoktoraj studentoj, esploristoj el aliaj kampoj kaj profesiaj tradukistoj aŭ interpretistoj lerni kiel fari esplorojn en la 21-a jarcento. Eblos al partoprenantoj aliri legomaterialon, individuajn reagojn, diskutfadenoj kaj plenkunsidaj prelegoj, kaj ili povos organizi sian laboron laŭ sia propra tagordo pere de unikaspeca interaga reta platformo.”

Por pli da informoj, inkluzive de la aliĝokondiĉoj, bonvolu konsulti la retejon.

RAPORTOJ

Agado de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

15 aprilo ĝis 15 julio 2020

Aktuale: la unua virtuala kongreso VEKI

Dum la lastaj tri monatoj la ĉefa zorgo en fokuso de la Estraro estis la unua Virtuala Esperanto-Konferenco de ILEI, nomita VEKI. VEKI iĝis oficiala evento kadre de la Monda Festivalo 2020 de UEA. Survojis granda preparlaboro kun E@I, kiu prizorgas platformon por multaj virtualaj eventoj ene de Esperantujo. UEA, ESF kaj privataj individuoj proponis financan subtenon. Grandan dankon iru al ĉiuj! *La Estraro petas ankaŭ ĉiujn neindiferentajn membrojn kaj homojn subteni la unuan virtualan kongreson de la Instruista Ligo!*

Multe kontribuas al preparado de VEKI kromestraraj personoj: unuavice, nia ĉefredaktoro de IPR Jozefo Nemeth, kiu samtempe administras la paĝaron de ILEI. Elisabeth Le Dru el Francio prizorgas la Tagon pri Pedagogio, ĵaŭdon la 30-an de julio. Estas preparata AMO-seminario kun podiaj diskutoj. Estas planata omaĝo al Tago de Esperanto, la 26-an de julio. Diversaj artistoj donos koncertojn kaj gajigos la etoson.

Venontaj kongresoj

Survojas preparlaboro por la kongreso 2021 en Edinburgo, Skotlando. Jam estas difinitaj la datoj, semajnon antaŭ UK, elektitaj la temo de la ĉefjara kunveno kaj eventuala kongresejo. Inter la Estraro kaj LKK estas diskutataj demandoj pri prezoj, loĝlokoj.

La Estraro

Dum majo-julio la Estraro ĉiujn du-semajnojn kunsidis rete por organizi sian ĉefkunvenon VEKI. La prezidantino Mireille Grosjean transdonis informojn al la estraro pri la laboroj kaj reciproke. Junie ŝi sendis salutmesaĝon omaĝe al la komenco de la trimonata Monda Festivalo.

La Komitato

Estas preparita por la reta komitatkunsido dum VEKI la tagordo, traktitaj diversaj demandoj rilate al reta realigo de la aranĝo. Estas ellaborita nova versio de Regularo pri reta voĉdono por aprobo de la Komitato.

Projektoj

Junie la prezidantino Mireille Grosjean lanĉis gravan enketon pri uzado de la latina alfabeto en lernado de infanoj tra la mondo. La celo estas fari esploron pri disvastigo de la latina alfabeto, kiu estas baza alfabeto por Esperanto (kaj ankaŭ baza alfabeto por algebro kaj aliaj fremdaj lingvoj), kaj transdoni tiun statistikon al UNESKO, se ĝi aspektas iom vastskala. Espereble tiu esploro kontribuos al agnosko de Esperanto.

Eldonado

Daŭras preparlaboro por eldono de la Manlibro pri Instruado de Esperanto, giganta laboro en la manoj de Dr Katalin Kováts. Plie ILEI provas atingi finan presstadion por la Manlibro por lerni Esperanton en la svahila.

Internacia Pedagogia Revuo (IPR)

ILEI kore dankas al Sinjorino Luiza Carol pro ŝia multjara enorma kaj diligenta laboro kiel provleganto de IPR! Kaj adiaŭas ŝin.

Daŭrigos la laboron la irana kolego Ahmad Reza Mamduhi. Ene de la Estraro komenciĝis diskuto pri atribulado de specialaj indeksoj al sciencaj publikaĵoj en IPR. Tiu demando jam estis en fokuso de ILEI, sed ne realiĝis ĝis la fino. Dum siaj retaj kunsidoj kaj per korespondado estraranoj kaj la redaktoro Jozefo Nemeth pritraktas diversajn manierojn fari tion.

Juna Amiko (JA)

Maje post la debatoj kaj voĉdonado pri la buĝeto la Estraro decidis, ke la lasta, kvara numero de JA en 2020 estos disponigita nur rete. *ILEI kore dankas ĉiujn pro la kompreno kaj konsentoj kaj anoncas, ke, se iuj nepre volas havi paperan ekzempleron, tiuj devas persone komuniki kun la redaktoro ĝis la fino de aŭgusto.*

ILEI en la reto

La Estraro zorgas, ke retaj komunikokanaloj regule kaj diligente pleniĝu per novaj kaj freŝaj informoj pri la Ligo. La prezidantino regule kaj abunde nutras per novaĵoj diversajn kanalojn de ILEI kaj ne nur www.ilei.info, du ILEI-paĝojn ĉe Fejsbuko*, kaj novan ĉefan kanalon Esperanto + Edukado ILEI ĉe YouTube. Aldoniĝas ILEI-adreso ĉe Telegram. Informas pri la novaĵoj el ILEI ankaŭ la bulteno EKO kaj edukado.net.

* <https://www.facebook.com/groups/115293975195238>, <https://www.facebook.com/groups/109522939206939>

Kunlaboro kun UEA

Preparado de virtualaj eventoj, unuaj en la historio de la Esperanto-movado, bone disvolviĝas en partnereco de la du organizoj. Ambaŭ sekvas preparadon unu de la alia. UEA strebas helpi siaflanke. ILEI pripensas kaj organizas sian partoprenon en la Movada Foiro kaj Tago de Lernado dum la Virtuala Kongreso (VK) de UEA. Krome, ILEI partoprenos en gravaj eventoj de VK. Revuo *Esperanto*, kiel kutime, publikigas gravajn oficialajn anoncojn de ILEI, inkluzive pri VEKI.

Kontaktoj kun enmovadaj institucioj

ILEI kunlaboras kun Katalin Kováts por prepari diversajn programerojn de VEKI. Kadre de la Tago de Lernado dum la Virtuala Kongreso de UEA la programo estas starigita de Marija Belosevic, kiel kutime. La prezidantino Mireille Grosjean ĉe edukado.net lanĉis enketon-esploron pri Deklaracio pri Homaj Rajtoj. Ĉiuj dezirantoj bonvenos! La celo de tiu laboro estas konigi la Homajn Rajtojn kaj celebri la 75-an datrevenon de la fondo de Unuiĝintaj Nacioj. Mireille Grosjean sendis salutmesaĝon al TEJO por la komenco de IJK, al E@I por la komenco de SES kaj al UMEA por la komenco de ĝia Kongreso.

Dankoj

Ĉiuj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu elkorajn dankojn!

Elena Nadikova (sekretario de ILEI)

Mireille Grosjean (prezidanto de ILEI)


Stipendio ESF ĉe la Universitato de Masaĉuseco

<https://skotlando.org/archives/840>

Al Guilherme Fians (kies laboron ESF subtenis pasintece) oni aljuĝis la stipendion, kiun ESF fondis ĉe la Universitato de Masaĉuseco. Pro la nuntempaj vojaĝomalfacilaĵoj kaj la fermiteco de la universitata biblioteko, kompreneble li ne scias, kiam li povos entrepreni ĝin. Guilherme faris prelegon pri sia laboro per Zoom je la 21-a de aprilo (vidu la ĉi-supran adreson).

LIBROJ

Ulrich Lins: *Dangerous Language*



<https://www.palgrave.com/gp/book/9781137549167> (vol. 1)

<https://www.palgrave.com/gp/book/9781352000191> (vol. 2)

<https://www.palgrave.com/gp/book/9783030239671> (bindita)

Ambaŭ volumoj de *Dangerous Language* nun haveblas kiel malpli kostaj poŝlibroj. Temas pri la anglalingva traduko, fare de Humphrey Tonkin, de *La danĝera lingvo*. Ankaŭ la duvoluma bindita kolekto ankoraŭ disponeblas.

Detlev Blanke: *Internationale Plansprachen (Eine Einführung)*

<http://d-nb.info/1206055073/34>

Per iniciato de Klaus Schubert la verko *Internationale Plansprachen (Eine Einführung)* (“Internaciaj Planlingvoj (Enkonduko)”) de Detlev Blanke el 1985, ankoraŭ la aŭtoritata germanlingva verko pri interlingvistiko, estas nun rete disponebla.

Oni povas elŭti ĝin, kiel paĝskanajojn en PDF-dosiero (granda je 250 MB), de la ĉi-supra adreso ĉe la Germana Nacia Biblioteko.

Lingvaj rajtoj en la Eŭropa Unio

<https://www.mohrsiebeck.com/buch/sprachenrecht-fuer-die-europaeische-union-9783161589591>

La Katolika Universitato de Eichstätt eldonis novan libron pri lingvaj rajtoj kaj leĝoj en la EU, *Sprachenrecht in der Europäischen Union*. La aŭtoroj, Claus kaj Karin Luttermann, pledas por plurlingvismo kaj kontraŭ unulingvismo.

ARTIKOLOJ

Mots: Plurlingvismo en internaciaj organizoj

<https://journals.openedition.org/mots/26521>

Kian rolon havas plurlingvismo en la politika laboro en internaciaj organizoj? Estas al tiu demando, ke la kontribuoj al ĉi tiu kolekto respondu, laŭ sia propra faka vidpunkto (la sciencoj de lingvo, informado kaj komunikado, politika scienco, sociologio, historio aŭ juro) vide al plurfaka dialogo. Temas pri la politikaj aspektoj de traduko en ĉi tiuj organizoj, kie ĝi estas ofte nepra, ĉu striktasenca tradukado – de homoj dungitaj kun la celo alilingvigi skribajn kaj parolajn tekstojn – ĉu la mensa agado implicita inter parolantoj de la sama lingvo, sed kiun ili ne ĉiuj same profunde konas. Ĉe “politikaj aspektoj” ni intencas esplori la implicojn kaj efikojn diversnivele estigitajn de plurlingvismo. Limdato por ricevo por malnetoj: 1 setembro 2020.

Kunordigata de Rachele Raus, Cécile Robert, Stefano Vicari kaj Chloé Gaboriaux.

Language Problems and Language Planning, volumo 44, numero 1 (2020)

<https://www.jbe-platform.com/content/journals/15699889/browse>

La nuna numero de *LPLP* enhavas:

- ◆ Eucharia Okwudilichukwu Ugwu. “Language policy and planning in Nigeria.” (“Lingvo-politiko kaj -planado en Niĝerio.”)
- ◆ Susana Pinto kaj Maria Helena Araújo e Sá. “Scientific research and languages in Portuguese Higher Education Institutions.” (“Scienca esplorado kaj lingvoj en portugalaj institucioj de supera edukado.”)
- ◆ Torsten Templin. “Language competition modeling and language policy evaluation.” (“Modelado de lingvokonkurado kaj lingvopolitika taksado.”)
- ◆ Merryn Davies-Deacon. “The orthography of revived Cornish as an attempt at pluricentricity.” (“La ortografio de la revivigita kornvala lingvo kiel provo pri plurcentreco.”)
- ◆ Guilherme Fians. “Mind the age gap. Communication technologies and intergenerational language transmission among Esperanto speakers in France.” (“Komunikaj teknologioj kaj intergeneracia lingvotransdonado inter Esperanto-parolantoj en Francio.”)

Esperanto kaj Endanĝerigitaj Lingvoj

<https://blogs.bl.uk/european/2020/05/esperanto-and-endangered-languages.html>

En majo la Brita Biblioteko publikigis en sia blogo mallongan artikolon pri sia Esperanto-kolekto.

Aperis numero de *Estudios de Lingüística del Español* dediĉita al interlingvistiko: “Volumen monográfico: En los límites del lenguaje: diseños artificiales y ficciones comunicativas”, kunordigita de Carmen Galán Rodríguez kaj Ma Luisa Calero Vaquera, kaj enhavanta:

- ◆ Francisco Javier Grande Alija. “Lingüistas y lenguas artificiales.” (Lingvistoj kaj artefaritaj lingvoj.)
- ◆ Ricardo Morant. “Lenguaje semafórico y transformación social.” (Semafora lingvaĵo kaj socia transformiĝo.)
- ◆ María Dolores Martínez Gavilañ. “La gestualidad en el diseño de lenguas artificiales: de los alfabetos manuales con fines criptográficos a las lenguas universales.” (Gesteco en la fasono de artefaritaj lingvoj: de ĉifrocelaj manalfabetoj ĝis universalaj lingvoj.)
- ◆ María Isabel López Martínez. “El irracionalismo poético, lenguaje cifrado en clave pictórica.” (Poezia neracionalismo, lingvo ĉifrita per bilda ŝlosilo.)
- ◆ Leticia Gándara Fernández. “Las lenguas inventadas de J. R. R. Tolkien: consecuencias del ‘Arte Nuevo’ o del ‘Nuevo Juego’.” (La inventitaj lingvoj de J. R. R. Tolkien: sekvoj de ‘Nova Arto’ aŭ ‘Nova Ludo’.)
- ◆ María Luisa Montero Curiel. “Un lenguaje inventado para una civilización inventada.” (“Inventita lingvo por inventita civilizacio.”)
- ◆ María Isabel Rodríguez Ponce. “Las lenguas artificiales musicales.” (“La muzikaj artefaritaj lingvoj.”) (“The musical artificial languages.”)
- ◆ Gerda Hassler. “Pasigrafía y antipasigrafía a finales del siglo XVIII y a principios del siglo XIX.” (“Pazigrafio kaj antipazigrafio en la malfrua dek-oka kaj frua dek-naŭa jarcentoj.”)
- ◆ Carmen Galán Rodríguez. “*De re philosophica linguae universalis* en las utopías racionalistas de la *Fabulosa Terra Austral Incognita*.” (“*De re philosophica linguae universalis* en la racionalismaj utopioj de la *Fabulosa Terra Austral Incognita*.”)
- ◆ Isabel Zollna. “La discusión de una lengua perfecta e ideal en la *Grammaire* de Destutt de Tracy (1805).” (“La diskuto de perfekta kaj ideala lingvo en Destutt de Tracy’s *Grammaire* (1805).”)
- ◆ José Carlos Martín Camacho. “La formación de palabras en las lenguas *a posteriori*.” (“Vortfarado en la aposterioraj lingvoj.”)
- ◆ José Carlos Martín Camacho. “La morfología flexiva de las lenguas *a posteriori*.” (“Fleksia morfologio en la aposterioraj lingvoj.”)
- ◆ Jesus Moinhos Pardavila. “Metáforas eufemísticas en el campo semántico de los órganos sexuales en esperanto.” (“Eŭfemismaj metaforoj en la semantika kampo de la seksorganoj en Esperanto.”)

Numero 14 de la revuo JKI (“Lingvo, Komunikado, Informado”) finpretiĝis, kaj estas elŝutebla el la retejo de la revuo mem, aŭ (kun kovropaĝo) el la revua retejo de la Universitato Adam Miczkiewicz (ĉe la dua adreso ĉi-supre).

Kelkaj artikoloj traktas esperantologian interlingvistikan temon (de Wim Jansen, Renato Corsetti, Sabine Fiedler, Sergej Kuznecov, Bradio Moro kaj Věra Barandovska-Frank). La esperantaj resumoj de ĉiuj artikoloj – kiel kutime – troviĝas fine de la revuo.

La lingvistika revuo de tiu universitato jam de 10 jaroj aperigas ankaŭ esperantologiajn interlingvistikajn artikolojn. De 2015 ankaŭ esperante eblas publikigi. Malnovaj numeroj troveblas same en la retejo de JKI. La numero el 2015 estis plene dediĉita al esperantologio.

Translating Sustainable Development Goals (SDGs) Into Chichewa: A Quick Efficacy Assessment

<http://www.ijllt.org/translating-sustainable-development-goals-sdgs-into-chichewa-a-quick-efficacy-assessment/>

Ĉi tiu referaĵo de Evans Lwara kaj Deborah Ndalama en la *Internacia Ĵornalo de Lingvistiko, Literaturo kaj Traduko* analizas la efikecon de la njanĝa (ĉeva) traduko de la Celoj por Daŭripova Evoluigo (de Unuiĝintaj Nacioj) lastatempa eldonita de la registaro de Malavio.

Lingvobaroj restas unu el la ĉefaj kialoj por la nepopulareco de la CDE inter la plimulto de afrikanoj, kaj tial la plimulto ne partoprenas en la realigo de la celoj. Do multaj afrikaj landoj entreprenis projekton por traduki la CDE en indiĝenajn afrikajn lingvojn. En Malavio tio okazis en 2018.

Tiu ĉi studo konsideris la tutan projekton por konstati ĝian efikecon en fono, en kiu antaŭaj tradukoj de diversaj politikaj kaj aliaj publikaj dokumentoj estas plenaj je gravaj komunikaj eraroj. Kiel oni organizis la njanĝan projekton por certigi pozitivan rezulton? Kiajn strategiojn la tradukistoj uzis por certigi efikan porlokan adaptan de la internacia CDE-dokumento?

La studo trovis, ke la traduko uzis kaj lingvajn kaj nelingvajn komunikostategiojn, el kiuj ambaŭ enhavis gravajn problemojn, kiuj kapablas malebligi efikan komunikadon. La konkludo estas, ke la informoj en la njanĝa versio de la dokumento restas grandparte nealireblaj por nelegipovaj kaj duonlegipovaj malavianoj.

Decolonial Subversions

<http://decolonialsubversions.org/>

Kontribuantoj, reviziantoj kaj tradukantoj estas bonvenaj en ĉi tiu plurlingva platformo de malferma atingo, dediĉita al elcentrigi okcidentan epistemologion en la homaj kaj sociaj sciencoj.

“*Decolonial Subversions* estas konceptita kiel platformo por la esprimo de historie silentigitaj scio-sistemoj ĉe la marĝenoj – ĉu en okcidentaj, orientaj, nordaj aŭ sudaj geografioj – kie eblas disvastigi esplorojn sen la limigoj difinitaj de la tipaj eldonkriterioj de okcidentaj industriigitaj socioj. Aldone, individuoj en kaj ekster akademioj povas dividi siajn esplorojn kaj pensadon sen devi regi la anglan lingvon aŭ obei rigidajn stilojn kaj formatojn. Tiaj kriterioj historie malfaciligis, ke esploristoj funkciantaj ekster okcidenteŭropaj kaj nordamerikaj pensosistemoj produktu kaj eldonu esplorojn, kiuj uzas nedominantajn konceptarojn kaj emfazas loke gravajn temojn ne ĉiam komprenatajn aŭ subtenatajn en la ĉefa fluo.”

La numero por la jaro 2020 inkluzivas la jenan eseon:

- ◆ A. Giridhar Rao, Universitato Azim Premji, Bengaluro, Barato. “Lingvaj homaj rajtoj kaj multlingva edukado: raporto de barata universitato.”

Sinalligo al modelo

<https://www.youtube.com/watch?v=Fls4WjDRsDs>

Tre interesan psikologian filmeton preparis Prof. Vicente Manzano-Arrondo de la Universitato de Sevilo, kiel parton de universitata kurso pri klimata ŝanĝiĝo kaj homa konduto. La voĉo parolas en Esperanto, sed subtitoloj haveblas ankaŭ en la hispana kaj la angla.

Enketo pri dedistanca lernado

<https://www.surveygizmo.eu/s3/90232576/Linguistics-instructors>

<https://www.surveygizmo.eu/s3/90232892/Linguistics-students>

Michał B. Paradowski de la Instituto de Aplikata Lingvistiko ĉe la Universitato de Varsovio informas pri tutmonda enketo pri la lastatempa adaptiĝo al fora lernado ĉe instruistoj kaj studentoj de lingvoj kaj lingvistiko.

La enketo estas anonima kaj uziĝos sole por scienca esplorado. Ĝi celas kompreni, kiaj cirkonstancoj, kondutoj, sintenoj kaj psikologiaj trajtoj helpis la adaptiĝon, kaj kio estis malfacila. Respondi ĝin okupas ĉirkaŭ duonhoron, kaj ĉirkaŭ 85% de la demandoj estas de la rapida plurelekta tipo.

Oni disponigas du versiojn de la enketilo:

- ◆ Tiu ĉe la unua adreso ĉi-supre estas por *instruistoj* kaj *asistantoj* en lingvistiko, modernaj lingvoj, lingvoinstruado kaj rilataj kampoj.
- ◆ Tiu ĉe la dua adreso estas por studentoj en tiuj samaj kampoj.

Laŭdire ĉi tiu demandaro estas iom malsama de la kutimaj enketoj en la mondo. Respondintoj juĝis ĝin “kompatema” kaj “kiel la propra persona terapiisto en ĉi tiu malfacila epoko”.

Instruista/esplora asistanto ĉe la Universitato de Ĝenevo

<https://www.unige.ch/adm/dirh/emplois/postesacademiques/>

Oni anoncis postenon de instruista/esplora asistanto ĉe la Universitato de Ĝenevo, kun eblo doktoriĝi pri lingvoekonomio aŭ lingvopolitiko. Bonega scipovo de la franca lingvo estas bezonata. Kandidatigoj alvenu plej malfrue je la 9-a de aŭgusto 2020.

Enketo ĉe la 75-jariĝo de Unuiĝintaj Nacioj

<https://un75.online/?lang=epo>

Unuiĝintaj Nacioj (UN) festas sian 75-jariĝon en periodo de grandaj defioj, inkluzive de la plej akra tutmonda sano-krizo en sia historio. Ĉu ĝi alproksimigos la mondon? Aŭ ĉu ĝi kondukos al pli grandaj dividiĝoj kaj malfido? Viaj opinioj povas fari diferencon.

UN proponas plenigi enketilon en pluraj lingvoj, ankaŭ en Esperanto. Viaj respondoj al ĉi tiu enketo influos tutmondajn prioritatojn nun kaj estontece.

(Ĉi tiu artikolo aperis en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto*: <https://sezonoj.ru/2020/06/un-6.>)

Pereis grava biblioteko pri planlingvoj

Informas Miguel R. Bento

En la numero 5/1985 de *IpI*, p. 13–14, Bernard Golden raportis interalie pri la rezulto de sia esploro pri la sorto de la biblioteko de IALA: en 1958 ĝi estis aĉetita de brazilano, Anésio de Lara Campos Júnior. Tiel la tuta kolekto de IALA (dokumentaro kaj proksimume 3000 libroj) veturis al Brazilo, aldoniĝis al la jama kolekto de Anésio (proksimume 1000 libroj) kaj trankvile kuŝis dum jardekoj, konsistigante unu el la plej grandaj privataj bibliotekoj pri planlingvoj en la mondo.

Samepoke, fine de la 50-aj jaroj, Anésio aperigis artikolojn en sia propra naturalisma lingvoprojekto (Hesperyo) kaj kunfondis la asocion International Language Association (kune kun Mario Pei kaj Floyd Hardin, inter aliaj). Mi trovis nur unu spureton pri posta planlingva agado de Anésio, nome mencion pri letero de li sendita en *Ido-Vivo*, 3/1988. Cetere, Anésio iom famiĝis ne pro sia planlingva agado, sed pro sia agado en konservativaj kaj ekstremdekstraj societoj.

Eksciinte ĉion tion mi interesiĝis pri la nuna stato de tiu kolekto, ĉar Anésio forpasis en 2012. Post kelka peno mi sukcesis kontakti lian filon kaj eltrovis, ke antaŭ longe la tuta kolekto estis disvendita/disdonacita al diversaj librobrokejoj kaj konatoj de Anésio. Do, bedaŭrinde la biblioteko nerekupereble pereis. Espereble venos tempo, kiam nia komunumo sukcesos pli bone atenti pri tiaj gravaj bibliotekoj.

La fandan cirkuleron de International Language Association kaj la mencion el *Ido-Vivo* oni povas trovi en la retejo de Ralph Dumain: <http://autodidactproject.org/other/ILR/ILA1.html>

Doktoriĝa posteno ĉe KU Leuven

<https://www.kuleuven.be/personeel/jobsite/jobs/55657470>

La universitato KU Leuven (Belgio) anoncis kvarjaran doktoriĝan postenon ĉe sia Fakultato de Artoj, kiel parton de la projekto “Lingvoj verkantaj historion: la efiko de lingvistoj preter lingvistiko (1700–1860)” financata de FWO (Fonds voor Wetenschappelijk Onderzoek). La celo estas studi la historion de lingvosciencoj kaj la formiĝon de lingvistiko kiel fakon el “postfaka” vidpunkto: kiel la studo de lingvo evoluis al aŭtonoma studobjekto, kiel ĝi influis aliajn studokampojn, kaj kion oni perdis en la formiĝo de la fako.

Victor Sadler

La 24-an de majo 2020, 83-jara, forpasis la eminenta esperantisto Victor Sadler. Sadler naskiĝis en 1937 en Britio kaj eklernis Esperanton en 1951, kiam li estis 14-jara. Li komencis uzi Esperanton, kiam li ekstudis en Kembriĝo, kie li fondis studentan Esperanto-klubon. Tra la jaroj membris en la klubo pluraj homoj, kiuj poste okupis gravajn postenojn en la Esperanto-movado. Sadler dum tiu tempo redaktis la informilon *La Studento de STELO*, la Studenta Tutmonda Esperantista Ligo, en kies estraro li aktivis.

Post la doktoriĝo pri fonetiko en 1962, li eklaboris fine de tiu jaro ĉe UEA en Roterdamo, por redakti la revuon *Esperanto*. Li redaktis ankaŭ *La Monda Lingvo-Problemo* de 1968 ĝis 1973 kaj okupiĝis pri la Biblioteko Hector Hodler. En 1968 Sadler fariĝis ankaŭ direktoro de la Centra Oficejo. Li transdonis la redaktadon de la revuo en 1974 al Simo Milojeviĉ. Ekde 1985 li longe laboris en la projekto pri aŭtomata multlingva tradukado pere de Esperanto, DLT (Distribuita Lingva Tradukado).

Li verkis *Esperantan-sinhalan vortareton* (1963) kaj, kune kun Humphrey Tonkin, *Terminaron por tradukado de Esperanto-dokumentoj* (1976). Sadler estis ankaŭ ano de la Akademio de Esperanto de 1970 ĝis demisio en 1983.

Hans Erasmus

<https://www.liberafolio.org/2020/04/27/forpasis-hans-erasmus/>

Fine de marto forpasis Hans Erasmus (1933–2020), la ĉefa arkitekto de la katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo.

“La granda merito de Hans estis triobla: li kunkreis la katedron, kontinuigis ĝin sub la nova flago de la Internacia Esperanto-Instituto kaj savis ĝin per transdono al la nuna partnero UEA”, skribis lia multjara kolego Wim Jansen. (El *Libera Folio*.)

Esperanto kaj la vera origino de la eŭro – reagoj

https://www.elconfidencial.com/mundo/europa/2020-02-16/euro-origen-esperanto-verdadero-identidad-comun_2455816/

En nia pasinta numero ni mallonge atentigis pri la ĉi-supra intervjuo, en kiu Germain Pirlot asertas, ke en 1995 li proponis la nomon *eŭro* por la estonta komuna valuto de la Eŭropa Unio.

Respondis legantoj!

- ◆ István Ertl: “Komparu tamen <https://www.liberafolio.org/arkivo/www.liberafolio.org/2010/la-patro-de-la-euro-ne-estis-esperantisto/>” (artikolon de Ulrich Matthias, kontraŭante la aserton).
- ◆ Christian Lavarenne: “Laŭ mi mankas almenaŭ en via prezento (kaj verŝajne ankaŭ en la hispana artikolo mem, sed mi ne scipovas legi tiun ĉi lingvon) jenaj precizigoj publikigitaj de Ulrich Matthias antaŭ jam pli ol dek jaroj.” Christian sendis ankaŭ samteman eltiraĵon el sia tezo *Espéranto: Son idée interne dans ses origines et quelques-unes de ses expressions et manifestations (aide ou obstacle à la diffusion de la langue?)*, volumo II, p. 318–320. Li aldonis: “Mi kaptas la okazon por denove danki ESF pro ĝia financa subteno al la esplorado kiu ebligis la verkadon de tiu ĉi tezo.”
- ◆ Germain Pirlot respondis jene: “Mi faros neniun komenton tiurilate, sed nur sugestos, ke vi legu jenan artikolon de Musée Banque Nationale de Belgique: <http://www.nbbmuseum.be/fr/2015/09/belgiums-founding-fathers-of-europe.htm>
- ◆ Ulrich Matthias komentis: “En 2017 aperis en germana lingvo filmeto kun la titolo *Eŭro: Kiu inventis la nomon?* Tie la tiama germana ministro pri financoj, Theo Waigel, rakontas, kiel li inventis kaj venkigis la nomon *eŭro* en 1995.” https://www.youtube.com/watch?v=rgxLqW_kmK4

Historio de la nuna *Informilo* kaj ĝiaj antaŭuloj

La *Novajletero por Interlingvistoj* aperis sub redakto de Ulrich Lins de 1974 ĝis 1977 (kvar numeroj). Eldonis ĝin CED.

La dua serio de *Informilo por Interlingvistoj* (IpI) aperis de 1983 ĝis 1990 sub la ĝenerala redakto de Ryszard Rokicki, kun helpo de Detlev Blanke, Charles Power, Edward Symoens kaj Ebbe Vilborg. La plena kolekto troviĝas en Vieno. Eldonis ĝin CED.

En 1992 aperis *Informilo por Interlingvistoj* (IpI) sub redakto de Detlev Blanke. Entute 100 numeroj – plus indekso. Kuŝas en Vieno paperaj kopioj (1/1992 ĝis 97/2016). Eldonis ĝin CED.

Elektronikaj kopioj de *Informilo por Interlingvistoj* (04/2010 ĝis hodiaŭ) aperas en la retejo de ESF (<https://www.esperantic.org/eo/publikajoj/ipi/>). Eldonas ĝin CED kaj ESF.

Ankaŭ la kompleta serio de la anglalingva versio *Information for Interlinguists* (IfI: 1/2017 ĝis hodiaŭ) aperas en la ESF-retejo (<https://www.esperantic.org/en/publications/ifi-information-for-interlinguists/>). Eldonas ĝin CED kaj ESF.

STIPENDIOJ DE ESF

Esperantic Studies Foundation havas du subvenciajn programojn: unu por Interlingvistika Subteno kaj alia por Ĝenerala Subteno.

Programo por Interlingvistika Subteno (IS)

Tio estas administrata de internacia komisiono sub aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ĝi aljuĝas malgrandajn subvenciojn, kutime malpli ol 2000 usonaj dolaroj, por helpi fakulojn kaj jam spertajn studentojn plenumi esplorojn en la fakoj lingvoplanado, interlingvistiko, transnacia lingva politiko, lingva justeco, kaj planlingvoj (inkluzive Esperanton). La subvencioj povas subteni aĉeton de (aŭ aliron al) esploraj materialoj, partoprenon en konferencoj, vojaĝadon al esplorbibliotekoj, subtenon de surkampa laboro, evoluigon de retejoj, kostojn de publikigo, k.s. Subvencioj IS estas aljuĝataj konkurse kaj kutime devas esti uzataj ene de unu jaro post ricevo de la subvencio.

Programo por Ĝenerala Subteno (ĜS)

Tio kovras ĉiujn tri aktualajn prioritatojn de ESF: Esploradon, Edukadon kaj Konservadon. Ĝi estas malferma al individuoj kaj organizaĵoj, inkluzive de universitatoj. Subvenciojn oni aljuĝas konkurse. Kvankam plej multaj subvencioj estas malgrandaj kaj kutime devas esti uzataj ene de unu jaro post ricevo, foje subvencioj estas aljuĝataj por pli longaj periodoj kaj en pli grandaj sumoj. Antaŭ ol peti subtenon, estas konsilinde sendi mallongan mesaĝon al admin@esperantic.org, por demandi ĉu la propono taŭgas. Petoj ĜS estas traktataj de subkomitato de la Estraro de ESF. Petoj ĜS, kiuj tamen kongruas kun la gvidlinioj IS, estos plusendataj al la Komisiono IS.

Limdatoj

Ekzistas tri limdatoj ĉiujare por subvencipetoj, en ambaŭ ĉi-supraj programoj:

- ◆ 31 januaro
- ◆ 30 aprilo
- ◆ 30 septembro

Por pli da informoj, bonvolu viziti: <https://www.esperantic.org/eo/stipendioj/stipendioj-de-esf>

Lastatempaj aljuĝoj

ESF ricevis nur unu proponon por financa subteno antaŭ la limdato de la 30-a de aprilo. Tion konsideris la komitato de CED, kaj ESF ĝojas anonci subtenon por la jena projekto:

- ◆ Hamza Magri por “Berberaj lingvoj en la Magreba regiono: defioj kaj daŭra serĉo por lingva justeco” — USD 1900

I \mathcal{P} I estas eldonaĵo de Esperantic Studies Foundation (ESF) en la nomo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. ISSN 1385-2191. Paralela anglalingva versio, *Information for Interlinguists (IfI)* estas ankaŭ disponebla. Ĉi tiun numeron redaktis Simon Davies kun helpo de Angela Tellier.

Por ricevi avizojn pri estontaj numeroj, aŭ por sendi eldonotajn informojn, retmesaĝu al ipi@esperantic.org. Limdato por la venonta numero: 30 septembro 2020. Kontribuadoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj. Ni akceptas materialon en Esperanto aŭ la angla, aŭ ideale kiel la saman tekston tradukitan en ambaŭ lingvoj. ESF en la reto: <https://www.esperantic.org>, <https://www.facebook.com/esperantic>. Tvitero: @esperanticsf, @esfacademic.

Estraro de CED

Humphrey Tonkin (direktoro, Usono), Irene Caligaris (Italio), Guilherme Moreira Fians (Brazilo/Britio), Federico Gobbo (Italio/Nederlando), Kimura Goro (Japanio), Mélanie Maradan (Svislando), A. Giridhar Rao (Barato), Orlando Raola (Usono), Ida Stria (Pollando), Angela Tellier (Britio). <https://uea.org/asocio/CED>